



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

unuiĝo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 45 Frankoj. Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

OKAZIS ĜENERALA KUNVENO DE U.N.E kaj

de NORMANDA FEDERACIO

en Hérouville Saint Clair (14) la 28-an de Marto 1998

La 28an de Marto posttagmeze, okazis en Hérouville Saint Clair la komuna Ĝenerala Kunveno de Unuiĝo de Normandaj Esperantistoj (U.N.E.) kaj de la Normanda Federacio (de U.F.E.). Tiu kunveno estis speciale grava, ĉar ĝi precipe celis trovi solvon al la gravega problemo de la maljuniĝo de la estraro kies anoj agas de jam tre multaj jaroj kaj ŝatus lasi siajn postenojn al personoj pli junaj, do pli agemaj kaj havantaj novajn ideojn. Sed malgraŭ gravaj alvokoj en la bulteno, dum pluraj jaroj, neniua nova kandidato sin prezentis.

Por komenci, nia Prezidanto Pierre POTTIER rememorigis la ĉeestantojn (ĉirkaŭ 20 personoj) pri la tempo kiam ekzistis veraj kongresoj kun pli ol 100 membroj kaj kun ankaŭ distra programo kaj ekskursetoj tra la regiono. Nuntempe, nia asocio povas organizi ĉiujare nur ĝeneralan kunvenon. Kial? Ĉar la estraranoj pli kaj pli maljuniĝas kaj ne trovas anstataŭantojn. La rezulto estas ke nia estraro konsistas nun el nur 4 personoj el kiuj 2 havas samtempe 2 postenojn.

Ĉu do oni devas dedukti ke nia asocio ne plu utilas? Laŭ mi, ne! Kiel ĝuste diris Petro Quillaud en la Bulteno 195 p.1: "La kerno de nia movado estas la urba grupo (aŭ klubo, aŭ rondo) Urbaj grupoj propagandas por internacia lingvo, organizante prelegojn, starigante budojn dum ekspozicioj, disdonante flugfoliojn kaj dokumentojn. Urbaj grupoj malfermas kursojn por instrui la lingvon kaj kunvenojn por ĝin praktiki. Sed kelkaj agadoj estas realigeblaj nur kun helpo de najbaraj grupoj: por organizo de finsemajna staĝo kaj rondvizitado de prelegistoj. Por tio, necesas regiona asocio " ...Al tio, ni povas ankaŭ aldoni ke ni ankaŭ bezonas regionan asocion por organizi pli efike informadon al la oficialuloj, precipe al membroj de la Eŭropa Parlamento, ktp... Yves Nicolas klare kaj ĝuste analizis la situacion en sia artikolo en la Bulteno 195, p. 4, 5 kaj 6 kaj tiu artikolo povus esti la bazo de nia diskuto pri la situacio en Normandio.

AGADRAPORTO:

Pro diversaj kialoj, inter aliaj, sanproblemoj, nia estraro ne kunvenis eĉ unufoje dum la jaro; kontaktoj okazis nur telefone. Sed la agado tute ne estis nula, dank'al la Bulteno kaj al la laboro de la lokaj grupoj.

VIVO DE LA GRUPOJ:**Grand Quevilly:**

Kursoj kaj konversacioj ĉiusemajne en la kadro de Amicale Laique. De 3 jaroj, ne plu estas kurso elementa por komencantoj pro manko de disponebla instruanto. Informartikoloj aperas kelkfoje en senpaga loka gazeto. Estas kelkaj spertaj esperantistoj en Rouen-Centre kaj en norda periferio; ili povus malfermi klubon en Rouen-Centre; ili ne ĉeestas la kunvenojn de Grand Quevilly

Les Andelys:

Dank'al la reveno de Sylvie Bonnet, la grupo renaskiĝis kaj invitis Rŭenanojn okaze de Reĝkuka Festo dum Januaro.

Fécamp:

Mouloud kaj Taous Touileb multe agas, foje kun helpo de Sino Lesueur. Mouloud instruas Esperanton al infanoj kaj denove prezentis budon pri Esperanto en la ekspozicio okazinta en la tago de Radio Amatoroj

Le Havre:

Kunvenoj unufoje monate. Ne plu estas propagando. Sro Huet gvidas kurson kun 2 lernantoj

Yvetot:

La grupo profunde dormas jam de 2 jaroj kaj bezonas junajn novulojn por revekiĝi

Hérouville Saint Clair:

Jam de 14 jaroj ekzistas tie forta asocio ĝuanta pri tre favoraj lokaj cirkonstancoj. 3 kursoj diversgradaj. Invitoj de alilandaj prelegantoj kun raportoj en Ouest-France. Traduko por Interreto (Internet) de interesaj paĝoj pri turismo kaj Normandio

Sud-Normandio:

Christian Lévêque provas organizi kunlaboradon inter diversaj spertaj esperantistoj loĝantaj en Manche kaj Orne

NORMANDA BULTENO:

Nun redaktata kaj tajpata de Pierre Quillaud per komputero. Reprodukta kaj sendata de Pierre kaj Maryse Lemarchand. Ĝi estas sendata al ĉiuj novaj esperantistoj eĉ ne aliĝintaj al U.N.E.. Ĝi estas ligilo inter ni kaj ankaŭ celas doni informojn pri la diversaj asocioj, renkontiĝoj, ktp... Ĝi estas sendata ankaŭ al la aliaj Esperanto Asocioj 162 ekzempleroj. Aperas 4 foje jare kun tre kontentiga enhavo

FINANCAJ RAPORTOJ:

En kaso la 26an de Decembro 1997;

Esperanto-Normandie (U.N.E.) 9658,73 FRF

Normanda Federacio de U.F.E. 3882,72 FRF

Ĉiuj raportoj estis unuanime akceptataj de la ĉeestantaro

RENOVIGO DE ESTRARO: (diskuto)

Yves Nicolas resumas sian artikolon aperintan en la bulteno N° 195 p.4 Li opinias ke devus esti minimume 1 membro de ĉiu grupo en la estraro kaj li faras 2 proponojn :

1°- trovi personojn en ĉiu grupo por realigi tiun projekton dum la tri venontaj monatoj; li mem zorgos pri tio.

2°- se tio ne eblos, minimume konservi la bultenon

La ĉeestantaro unuanime aprobas tiujn proponojn. Pro tio oni ne reelektas la komitaton. Tion ni faros post kelkaj monatoj, laŭ la rezultoj de tiuj provoj.

Post interveno de Sro Marco Téani kiu memorigas ke la Verduloj estas tre favoraj al Esperanto, la kunveno estas fermata je la 17a horo

Pierre POTTIER

En dehors des débats

Comme ils en ont l'habitude, nos amis d'Hérouville ont fait le maximum pour nous accueillir.

Nous nous sommes retrouvés au Centre International de Séjour bien connu des Normands puisque d'autres manifestations espérantistes s'y sont déjà tenus, entre autres le Congrès de SAT-Amikaro-.

Le groupe d'Hérouville offrit aux participants l'apéritif qui permit aux langues de se délier, chacun étant heureux de retrouver des amis des autres groupes. Les conversations (en Esperanto bien sûr) continuèrent pendant le repas copieux bien que d'un prix raisonnable.

Après le repas, nous nous sommes dirigés vers la Maison des Associations; nous y avons retrouvés d'autres amis arrivés plus tard. Puis ce fut le début des débats : voir le compte-rendu de notre Président.

La partie culturelle ne fut pas négligée grâce à la très intéressante conférence de Zdravka Bojčeva sur la Bulgarie

NORMANDAJ ESPERANTISTOJ en LITOVIO

+++++

Lastsomere, 4 membroj el la grupo de Grand Quevilly kaj 3 aliaj samideanoj flugis ĝis Litovio, respondante al invito partopreni la 300an jubileon de la urbo Vilkaŭiŝkis.

En 1993, la grupo "Yoga-Esperanto" de Grand Couronne akceptis Stacys, litova esperantisto renkontita dum SAT kongreso en Kaunas kaj 5 eminentulojn el la urbeto Vilkaŭiŝkis. Okaze de la jubileo, niaj litovaj geamikoj, siavice, deziris konatigi al ni sian landon. Litovio estas malgranda lando: 65200 km² kie loĝas 3.738.800 homoj.

Ni surteriĝis ĉe la flughaveno en Vilnius post 2 horoj kaj duono da vojaĝo. Stacys kaj nia stiristo Vitas atendis nin kaj kondukis nin per buseto ĝis la loko de nia restado. Vilnius estas la ĉefurbo de Litovio. Tra la urbo, oni sentas impreson de spaco, de homskala urbo. 584400 loĝantoj vivas tie.

En Vilkaŭiŝkis, en la domo de Stacys, ni retrovis niajn geamikojn: Birute, franclingva profesorino, Algirdas kiu ĵus fariĝis deputito, Arturas kiu responsas pri kulturo en la urbo, kun iliaj familianoj. Manĝaĵo, trinkaĵo, amika etoso rapide komfortigis nin. Ni loĝis en la domoj de niaj amikoj, iuj en hotelo. Niaj gastigantoj tre zorgis pri nia komforto kaj ĉiam anticipis niajn dezirojn.

Nia restado estis ambaŭ oficiala kaj amika. La programo preparita de niaj gastigantoj estis tiel abunda ke mankis al ni tempo por skribi poŝtkartojn. En Vilnius, ni havis bonŝancon viziti Parlamenton. Ni malkovris la Baltan Maron kaj ĝiajn belajn sablajn strandojn en Palanga. Feliĉe, ni ne kunprenis niajn bankostumojn ĉar la akvo estis malvarmeta: nur 10°. En Palanga, ni vizitis belegan muzeon pri sukceso (fr.: *ambre jaune, succin*). Kvankam estis tago de fermo de la muzeo, la direktoro akceptis nin kaj li mem gvidis nin en tiu eksterordinara loko. Ni malkovris Rumŝiŝkes kie estas rekonstruitaj malnovaj tradiciaj domoj el la diversaj regionoj de Litovio. Nia lasta vizito kondukis nin al Kaunas kie ni povis vidi kaj foti straton Zamenhof.

La oficiala parto de nia restado estis zorge preparita. Oni farigis nin "honoraj civitanoj" de la urbo. La urbestro akceptis nin ĉe la urbodomo. Ni ĉeestis eksterordinaran kunvenon de la urbkonsilantaro. Ni vizitis mezlernejon kie studas lernantoj 6-jaraj ĝis 18-jaraj. Ni konstatis ke en la lernejo estas dentistejo kaj riĉa biblioteko. Tie, ni renkontis kelkajn esperantistojn; 5 el ili estas junaj studentoj.

La Muzeo de la urbo riĉiĝas iom post iom per objektoj kaj arkivoj disigitaj dum la antaŭa reĝimo. Ni eksciis ke alia fama Franco estis en Vilkaŭiŝkis preskaŭ 2 jarcentoj antaŭ ni : Napoleono restadis tie en la jaro 1812, kaj de tie deklaris militon al Rusio !

Ni partoprenis la tre oficialajn kaj famobrilajn festojn okaze de la 300a jubileo kun paroladoj, inaŭguroj, koncertoj, spektakloj, piroteknikaĵo....

Ni admiris dinamismon de tiu popolo kaj ties fidelecon al sia tiel riĉa kulturo.

Ekster oficialaj festoj, niaj amikoj vivigis al ni emociplenajn momentojn. Iun vesperon, en la arbaro apud la limoj de Pollando kaj Rusio, ĉe lagobordo, ili organizis bonegan piknikon kaj poste kantis tradiciajn kantojn, akompanitaj de akordionisto. Estis vera momento de amikeco kaj de komunaj sentoj.

La tago de foriro alvenis. Ni konstatis ke amikaj ligiloj ĉeestis. Ĉu estos sekvo al tiu renkonto ? Marija komencas lerni Esperanton; Algirdas ekkomprenas francan lingvon kaj iomete parolas ĝin. Reprezentantoj de ambaŭ urboj renkontiĝis; interŝanĝoj eble okazos inter gimnazianoj.

Certe, la malproksimo estas malfacilaĵo, tamen tio kio estas semita iam kreskos.

Suzanne

LE HAVRE:

Adiaŭ samideanino Nelly !

Fine de Aprilo, amikino Nelly Peltier forlasis nin ĉirkaŭita de ŝia familia rondo.

Ŝia forpaso estas malĝojiga aflikto kaj ni sincere kondolencas ŝiajn gefamilianojn.

Kvankam ŝi ne plu vizitadis esperantistajn okazaĵojn pro sanaj problemoj, kvankam ŝi ne plu estris ekde 1974, ŝi same kaj konstante varbadis por nia kaŭzo, apogis siaflanke larĝskalajn kampanjojn, havis fervoron por "eksteraj rilatoj" kiuj ebligis ekspoziciojn en trafikaj lokoj.

Niaj klubanoj konservos bonajn rememorojn de ŝia iama agado ene de nia asocio : ŝia entuziasmo kaj ŝia lerteco surkampe de komunikado montris al ni la vojon. Sendube, ŝi estis ankaŭ estimata de regionaj samideanoj kun kiuj ŝi partoprenis amikajn manifestaciojn

Sylvie CARON

NOTRE DAME DE GRAVENCHON (76)

Junularo interesiĝas pri Esperanto

Mi ĵus rekomencis kurson kun 7 gelernantoj en Petitville-Gravenchon. Pastro Bécu, malnova esperantisto, parolas ofte pri Esperanto al liaj katekismaj gelernantoj. Do se li trovas kelkajn infanojn kiuj interesiĝas, li petas min instrui ilin (temas nur pri iniciato ĉar mi mem ne parolas tre bone). Mi ankaŭ povas paroli pri Esperanto al aliaj gelernantoj de la gimnazio kie mi instruas. Tiel, iom post iom Esperanto vojiras. Oni prisemas : kelkaj semoj eble ĝermos

Danielle Ordonaud

DUCLAIR : ZAMENO - l'espéranto expliqué aux enfants

Notre ami Romain Langlois a mis au point un programme dont il est l'auteur, qui présente de manière succincte et ludique l'Espéranto aux enfants.

Le programme tourne sur PC avec Windows 95. Il est diffusé en freeware, c-a-d- que tout le monde a le droit de le copier et de le diffuser librement. Une copie peut être obtenue auprès de l'auteur contre un chèque de 15 F équivalant aux frais de port, prix de la disquette et impression de la documentation.

Contactez : Romain LANGLOIS , l'air du Temps

1731 route du Bord de Seine , 76480 DUCLAIR

GRAND QUEVILLY :

Kunveno okazas ĉiusemajne; konversacioj, tradukoj, klarigoj de gramatikaĵoj , kantoj konsistigas la tagordon.

4 membroj partoprenis SAT Amikaran kongreson en Bretonio

5 partoprenos la Universalan Kongreson en Montpellier.

Okaze de Forumo de Asocioj, la 4an de Aprilo, nia asocio starigis budon en Théâtre Charles Dullin; ni tiel havis okazon informi pri nia lingvo.

Ni pli kaj pli sentas la necesegon de grupo en Rouen-Centre kaj norda periferio.

Ni ankaŭ nepre bezonas instruiston por elementa kurso, ĉar kial propagandi se ne eblas instrui la lingvon ?

Ni estis afliktoj pro la forpaso de nia amiko André Roblin

ESPERANTO NORMANDIE**COTISATIONS ABONNEMENTS 1998**

Voici la première liste des abonnements - cotisations pour l'année 1998.

Nous sommes à la moitié de l'année et beaucoup d'entre vous n'ont pas encore envoyé la participation financière dont nous avons besoin pour continuer notre action.

Ci- dessous le "tableau d'honneur" de ceux qui ont déjà réglé leur cotisation; si votre nom ne figure pas dans cette liste c'est que vous avez oublié; nous vous remercions de bien vouloir réparer votre omission.

Gesinjoroj: Angenault, Bataille, Bessière, Bonnet, Boucher, Boudet, Caron, Chalm, Defrance, Deuff, Domingo, Dubois, Duflo, Etienne, Gibaux, Giordano, Guérault, Guerre, Helbert, Haulard, Huet, Jourdain, Klein, Lamy, Langanay, Lebrun, Lecouvreur, Legros, Leguillon-Décosse, Lemarchand, Leroy, Lesueur-Comte, Levesque, Lévy, Loisel Loison, Longuet, Masseron, Marie, Mary, Maurouard, Mendès, Michaud, Millet, Moyon, Nardin, Peltier, Pillet, Pottier, Quillaud, Robiolle, Roblin, Séry J, Séry S, Tailpied, Téani, Touileb, Varneville

@@

FORPASI DU SINDONEMAJ AMIKOJ

Kelkajn tagojn antaŭ SAT Amikara Kongreso forpasis Roland Grandière Prezidento de SAT Amikaro

Kelkajn tagojn post tiu kongreso kiun li partoprenis, mortis ankaŭ Marcel Ternant aktivulo de SAT, respondeculo pri duagrada perkoresponda kurso kaj sekretario de Franca Esperanto Instituto (FEI)

Tiuj du amikoj dediĉis sian tutan vivon , ĝis morto, por Esperanto
Ilia morto estas grava perdo por tuta Esperanto Movado

@@

ESPERANTO - NORMANDIE deziras agrablajn feriojn al siaj legantoj.

Praktiku Esperanton

SUKCESU UNIVERSALA KONGRESO en Montpellier

Suplemento de N° 196

Lastminuta Komunikio

HEROUVILLE :

Nia grupo akceptos 11 esperantistojn el Tihvin; nia ĝemela urbo apud Sankta Peterburgo, tuj post la Universala Kongreso en Montpellier. Nin mem ili akceptis en 92, ni tiam dekunuope vojaĝis.

Tia akcepto ankaŭ signifas ampleksan buĝeton kiun nia normala kaso ne povas elteni, ĉar ni pagas ĉiujn elspezojn de Montpellier al Caen, kaj poste de Caen ĝis Parizo. Por tion atingi, ni partoprenis elsubtegmentan foiron " Foire aux greniers" kie ni rikoltis 2600 F per vendo de ĉiaj antikvaĵoj alportitaj de multaj klubanoj.

Al tiu sumo aldoniĝas subvencio 1 500 franka de nia Unuiĝo Normanda kaj espereble materialan helpon flanke de nia urbestro.

Ni nun ilin atendas por turismi, babiladi, kaj prelegi dum publika vespero.

En julio, Gigi kaj Gérard Sénécal akceptos Japaninon kiu ankaŭ partoprenos la Universalan Kongreson kaj vizitos por la 1a fojo nian landon. Interŝanĝo telefona jam okazis je la 6a matene !...

Mia Normandio




FRED. BERAT

Andante



Je re-nas-ki-ĝo de l'es-pe-ro, Kaj ki-am vin-tro


Mi vi-dis mon-ton hel-ve-ti-an, Kun lig-no dom' kaj



Dum vi-vo ve-nas la mo-men-to en ti-u re-vo

es-tas for En fran-ca dol-ĉo de a-e-ro Dum bri-

gla-si-ar. Kaj la pej-za-ĝon i-ta-li-an Kun bark'



flu-gas for, Kaj la a-ni-mo en si-len-to, de-di-

las la sun-lu-ma or', Dum re-ver-di-ĝas la na-tu-ro, Kaj

sur ve-ne-ci-a mar'. Al ĉi-u hej-mo, jen sa-lu-to! Ne-



ĉas sin al re-me-mor'. Se ti-am mi-a ha-ca mu-zo Am-

de hi-rund'ne-ĝo-jas kri', Noin lo-gas mi-a Nor-man-di-o;

ni-u ĝin me-ri-tas pli ol mi-a be-la Nor-man-di-o:



Kam tojn la-sas for de si, re-i-ros mi al Nor-man-di-o:

En ti-u lan-do ja nas-ki-ĝis mi.

En ti-u lan-do ja nas-ki-ĝis mi

En ti-u lan-do ja nas-ki-ĝis mi